# Esperanto en Danio

16-a jarkolekto • n-ro 3 • junio 2009




**Infana koruso kaj kongresanoj antaŭ ekmarŝo**

**Esperanto en Danio**
membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

**Adreso de la asocio/prezidanto:**
Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 1551-805 7370
UEA-kodo: deaa-t

**Kromaj estraranoj:**
Arne Casper Mortensen (kasisto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Finn Østerbæk (vicprezidanto)
Bent Jensenius
Regin Larsen
Ole Terkelsen

**Redakcia adreso:**
Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 32 50 50 88 eed@esperanto.dk

**Presado:**
DDFO

**Adresŝanĝoj al:**
La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**01.09.2009**

## Enhavo

**Rerigardo al la jarkunveno......3**
**Protokolo..................................4**
**Dumkongresa kurso.................7**
**Eŭropa kongreso......................8**
**Rakonto pri Esperantomarŝo 10**
**Forpaso...................................12**
**Brileto en Meza Oriento.........13**
**Næstved..................................14**
**Kopenhago..............................15**
**Ĉeesto karnevala....................16**
**Diplomatia piedpilko..............16**
**La 9-a KEF..............................17**
**Legio de Bona Volo................21**
**Esperanto en la balotoj..........22**
**Nokto de lingvoj.....................23**
**UEA rete viviĝas.....................25**
**Pasporta Servo surrete..........26**

# Rerigardo al la jarkunveno

Dum la semajnfino 25-26 de aprilo okazis la jarkunveno de DEA. La programo de la sabato enhavis prelegojn de Zlatko Tišljar, ĝenerala sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio, kaj de d-ro Aleksandro Melnikov el Rusio. Dum la distra vespero muzikis la konataj danaj fratoj Jonas kaj Mathias Dalmose.

Sabate Zlatko Tišljar prelegis pri ”Meritoj de Zamenhof por la vivanteco de Esperanto” kies tezo estis ke ne la kvalito de Esperanto kiel lingvo kaŭzis ties vivantecon, sed la intuicio de Zamenhof pro kiu li reklamis E-on kiel ilon por plibonigi la mondon.



*Melnikov kaj Tišljar diskutas*

Post li, d-ro Aleksandro Melnikov prelegis amuze pri ”Ekparolu, por ke mi vin vidu, aŭ ĉu esperantisto rekoneblas laŭ paroloj?”. Poste ankoraŭ, Tišljar prelegis pri sia tezo ke ”Al EU mankas lingvo kiu simbolos ties identecon”. En la posta diskuto evidentiĝis, ke ambaŭ prelegintoj volonte rezignos pri tutmonda rolo de Esperanto, se Eŭropo bezonas ĝin kiel identigilon kontraste al la aliaj mondopartoj. Interesa kaj ekzameninda vidpunkto, sed mankis tempo kaj disputemo por plukonduki la debaton.

Dimanĉe okazis la generala kunveno de DEA , de la junulara sekcio DEJO kaj de la dana ILEI-sekcio. Ileana Schrøder estis reelektita kiel prezidanto de DEA (vidu la protokolon ĉi-sekve), Regin Larsen estis nove elektita kiel prezidanto de DEJO, kaj Bent Jensenius transprenis la postenon de ILEI-sekciestro.

# Protokolo

***de la Ĝenerala kunveno de DEA 2009 okazinta la 26-an de aprilo en Kulturdomo Tomsgårdsvej 35 en Kopenhago.***

1. Elekto de kunvena gvidanto
   Tara Gregers estis elektita kiel gvidanto.

2. Elekto de protokolanto
   Betty Chatterjee estis elektita kiel protokolanto.

3. Jara raporto
   Unue la prezidantino pardonpetis pro la prokrasto de la kunveno, kaj sekve ŝi laŭtlegis la Jarraporton kies enhavo legeblas en 'Esperanto en Danio' n-ro 2. aprilo 2009. La raporto estis aprobita.
   Komentoj kaj demandoj: Kim Henriksen memorigis la membraron pri la pasintjara propono de kolokvo pri la estonteco de la Esperanto-movado. Ileana Schrøder promesis ke la estraro pripensos la proponon.

4. Jara kalkulaĵo
   Post kelkaj klarigoj la jara kalkulaĵo estis aprobita.

5. Laborplano de DEA

   1. *Informado*
      Foiroj en Kopenhago kaj Aalborg.
      Lingvofestivalo.
      Kulturaranĝo la 5.an de junio kunlabore kun la Kulturdomo.
      Organizadoj de prelegoj.
      Flegado de la kontaktoj kun oficialaj instancoj kaj NRO-oj (= NeRegistaraj Organizoj).

2. *Instruado*
   Kunlaborado kun ILEI-sekcio por plifortigi la lingvan nivelon de niaj membroj pere de kursoj kun eksterlandaj gastoj.
   Apogi la perfektiĝon de junaj instruantoj.
   Eldono de vortaro dana-esperanta.

3. *Utiligado*
   Organizi jarkunvenon.
   Celebri la Tagon de Lingvoj kaj la Zamenhofan jubileon kunlabore kun la Pola Ambasado la 25-an de septembro.
   Apogi la agadon de DEJO.
   Eldoni historion de la dana Esperantista movado.
   Subteni la utiligon de Esperanto fare de niaj lokaj kluboj.

6. Proponoj
   La estraro proponis aldonon de la vorto «aŭ la membrorevuo» al punkto 10.4. kaj la nova teksto estas:
   *La raporto de la estraro, kune kun la kalkulaĵo de la pasinta kalkulaĵa jaro, subskribitaj de la prezidanto, de la kasisto kaj de la revisoroj, estas publikigita per la hejmpaĝo au la membrorevuo de la asocio minimume 1 semajnon antaŭ la ĝenerala kunveno. Membroj kiuj deziras tion, povas ricevi ĝin perpoŝte.*

7. Elekto de prezidanto
   Ileana Schrøder estis reelektita.

8. Elekto de estraranoj
   Jens S.Larsen estis reelektita kaj Regin Larsen estis novelektita.

9. Elekto de anstataŭantoj
   Stanislaw Mielczarek estis reelektita kaj Finn Østerbæk estis elektita.

10. Elekto de revizoroj kaj anstatauanto
   Tara Gregers kaj Lars Kromann akceptis reelekton (li informis ke venontjare li ne akceptos reelekton).
   Kim Henriksen akceptis reelekton kiel anstataŭanto.

11. <u>Ĝenerala kunveno 2010</u>
La venonta jarkunveno de DEA okazos la 24 – 25-an aprilo 2010 en Dalum Landbrugsskole, Odense. La prezo estos po 840 kronoj por persono. La propono estis akceptita.

12. <u>Eventualaĵoj</u>
Kim Henriksen informis pri KEF kaj pri la Esperanto kurso kiun Regin gvidas en la junulara domo (15 lernantoj).
Peter Weide informis pri sia artikolo en la revuo Esperanto. Li ankaŭ memorigis nin pri la eblecoj informi politikistojn pri Esperanto okaze de la Eŭropa balotado.
Ileana Schrøder informis pri la propono de Wonderful Copenhagen, ke ni invitu la UK-on al Kopenhago en 2014. Ili pretas apogi la okazaĵon. Osmo Buller konsideros la proponon, tamen preferonte, ke ĝi okazu en 2011. Li gastos Kopenhagon verŝajne fine de majo por ke oni priparolu pri la propono. La esperantistaro en Malmø pretus helpi al DEA kaj ankaŭ pluraj danaj junuloj esprimis sin positive.



*DEA-membroj aŭskultas preleganton*



*La fratoj Dalmose koncertas en la jarkunveno*

# Dumkongresa kurso

Dum la ĉeestado de Aleksandro Melnikov en Kopenhago ni prenis la okazon organizi dutagan kurson por daŭrigantoj en nia sidejo. Evidentiĝis kiel supozate, ke Aleksandro estas brila kaj amuziga instruisto kaj la kursanoj estis treege kontentaj pri lia instruado.



# Eŭropa kongreso en Herzberg

Sub la slogano ”Esperanto por multkultura Eŭropo” pli ol 400 esperantistoj (16 danoj) kunvenis en la ĉarma kaj bela sunbrilbenata Herzberg de la 28.5 ĝis la 3.6. en bela novkonstruita gimnazio. La programo estis abunda kaj varia, kaj precipe la solena inaŭguro kun partopreno de gravaj germanaj politikistoj de la regiono estis strategie tre fruktodona por la aranĝantoj. La vesperaj aranĝoj estis buntaj, interalie kun partopreno de muzikgrupoj de la gimnazio, infana dancensemblo el Toruno, hungara parlamenta koruso, pianoludado de Ulrich Mattke kaj Johannes Mueller, kantado, prezentado de junulklubo de Pöhlde, la konata kantisto Ralph Glomp, teatra vespero kun Cristoph Frank pri Münchhausen.

Tre sukcesa estis la ĉeesto de la kongresanoj ĉe la dimanĉa urba festparado, pentekosta urba tradicio kun partopreno de diversaj uniformitaj grupoj kaj muzikistaroj, kie ni estis la solaj ”civiluloj”, sed multombraj kaj tre videblaj, kunportante naciajn kaj Esperantajn flagojn. Kortuŝe estis trapasi la belan rezidejon de pensiuloj kiuj, sidante en vicoj antaŭ la domo, kvazaŭ kiel partoprenante teatraĵon, ĝuis la eventon elkore salutante. La marŝo trapasis la tutan urbon, ĉie atendita de la urbanoj kiuj certe neniam antaŭe spertis tiom da esperantistoj kaj tiamaniere povis konstati la vivantecon de nia movado.



Eĉ se la programo estis alloga, la ĉefa tasko de mia partopreno estis la partopreno en la asembleo de Eŭropa Esperanto-Unio, kiel reprezentanto de Danio. La prezidanto de EEU Séan O'Riain kaj la sekretario Zlatko Tisljar informis pri la agado de EEU kaj de la EU-parlamentanino M. Handzlik. Ŝi senĉese informis la parlamentanojn koncerne lingvajn situaciojn, por ke ili rimarku ke ni eksistas. Pri la problemo de plurlingveco EEU venis al la ideo fari grupon kie estos reprezentataj ĉiuj frakcioj de la parlamento, entute 15 personoj, kiuj havos la rajton postuli respondojn de la parlamento. Dum la lasta periodo la parlamentanino L. Novak aranĝis ekspozicion pri Esperanto kaj Séan kontaktis Bronislaw Geremek kun peto estri tiun interparlamentan grupon, kaj pere de tiu grupo akiri certan rolon pri Esperanto, ekzemple pri la propedeŭtika valoro de la lingvo. Bedaŭrinde Geremek mortis tagon antaŭ la unua kunveno pro trafikakcidento.

Intertempe venis nova ebleco, la raporto kiu rekomendas du-lingvan lernadon: unu grandan lingvon kaj duan, propre elektitan, do, kiun ajn lingvon kiu ne estas vere agnoskita. Tio ebligus al la minoritatoj elekti sian minoritatan lingvon, aŭ Esperanton. La parlamento traktos tiun oficialan proponon dum la venonta mandato. Ni prezentos la ideon ke por havi efektivan resulton la solvo estas enkonduko de interŝtupa studobjekto: Esperanto. Temas pri unujara studado de la plej oftaj morfemoj, proksimume 500 bazaj vortradikoj, por ke la lernatoj povu uzi la ĉiutagan bazon de la lingvo. Alia rezulto de tiu propono estus ke memorante tiun lernadon de iu baza lingvo, ili preferus daŭrigi per ĝi. Ni havas ankaŭ alian eblecon, nome enkonduki eksperimentan 3-jaran instruadon, post kiu oni rajtas enkonduki tiun lingvon. La tria elemento de la strategio de EEU koncernas la Eŭropan identecon, kiun mankas, ĉar nur la lingvo povas doni ĝin. Ni devas atentigi pri tiu aspekto.

Al la demando pri la ebleco de M. Handzlik esti denove elektita kiel EU-parlamentano Georgo Handzlik respondis, ke estas preskaŭ tute certe ke ŝi estos elektita, kaj ni kompreneble varme gratulis! Pri L. Novak ne estas la sama certeco, kaj ni sendas bondezirojn tiurilate. Fine ni ricevis la informon ke la venonta EEU-kongreso okazos post 2 jaroj en Irlando.

*Ileana Schrøder*

# Danko al Mogens Rude Andersen

Mogens Rude Andersen estas konata kiel tre kompetenta instruisto kaj esperantisto. Ni ĉiuj admiras liajn bonan lingvaĵon kaj tre interesajn prelegojn, kiuj ĉiam estas perfekte preparitaj. Dum la jaroj li helpis la gvidantojn de la dana Esperanto-Movado per aranĝoj, prelegoj, ekspozicioj ktp. Ĉiam li estas helpema, kaj neniam oni vane petas lian helpon, tute egale pri kio temas.

En 2008 Mogens Rude Andersen faris bonegan prelegon pri la venko ĉe Unesko en Montevideo, 1954, en la Esperanto-Kulturgrupo kaj faris belan ekspozicion tie. Poste DEA petis lin prelegi dum sia pasintjara jarkunveno pri la sama temo kaj samtempe aranĝi la ekspozicion pri Unesko kaj la dana Esperanto-historio. Li akceptis, kaj ambaŭ pli ol brile sukcesis! En siaj prelegoj Mogens Rude ĉiam akcentis la meritojn de la menciitaj personoj. Koncerne la plej grandajn meriton kaj mejloŝtonon de la Esperanto-Movado iam ajn, nome la venkon ĉe Unesko, li, kompreneble, aparte akcentis Ivo Lapenna, ĉar sen li la Internacia Lingvo, Esperanto, neniam estus atinginta la konsultajn rilatojn kun Unesko. Bv. mem studi la hejmpaĝon de la Fondaĵo Ivo Lapenna: www.ivolapenna.org.

Mi deziras tutkore danki al Mogens Rude Andersen pro la enorma laboro, kiun li faris dum la jaroj. Liaj nomo kaj laboro restas kiel lumturo en la historio de la dana Esperanto-Movado.

*Birthe Lapenna*

# Rakonto pri Esperantomarŝo

Antaŭ multaj jaroj mi per mia patro aŭdis Esperanto-radioprogramon el Nederlando. Mi nun ne memoras pri kio oni parolis en la programo, sed mi ankoraŭ memoras la rekonigan melodion. La titolo de la melodio estas "Esperantomarŝo".

Multmaniere mi provis trovi la muziknotojn de la marŝo, kaj fine estis eble por mi mendi ilin ĉe la eldonejo Klavarskribo en Slikkerveer, Nederlando. Kiam mi ricevis la notojn, mi vidis ke la ĝusta titolo de la marŝo estas ”Esperantomarŝo, Oficiala marŝo de la Internacia Esperantomovado”. Komponisto estas Jac. Feitsma.

La muziknotoj kiujn mi ricevis, estis specialaj notoj por piano laŭ unika sistemo de la eldonejo. Mi do aranĝis la marŝon por Bygstad Skule- og Hornmusikk, kiun mi kondukas. Kiel finon de la sezono por la korna orkestro ni ludis programon konsistantan el muziko de multaj partoj de la mondo, kaj la lasta punkto de la programo estis ”Esperantomarŝo”.

Kiam la orkestro koncertas, mi kutime rakontas pri la muziko. Nu mi ankaŭ rakontis pri la Esperantomarŝo, la laboro trovi kaj aranĝi la muzikon, kaj mi multe ĝojis kiam mi nun al mi mem donis la eblecon informi pri Esperanto kaj krei intereson pri la lingvo en la Zamenhofa jaro.


*Kurt Erland, Førde, Norvegio*



*Bygstad Skule- og Hornmusikk, Bygstad, Norvegio*

# Forpaso

***Bent Bjarke Nielsen 19.03.1925 – 01.05.2009***



Nia fidela, helpema kaj amata amiko Bjarke pacplene forpasis post mallonga malsano la 1-an de majo en la malsanulejo de Glostrup.

Bjarke membriĝis al KEK en 1954, kaj li ofte kaj ageme partoprenis kunvenojn en la klubo. Liaj multaj interesoj estis avantaĝoj al la klubo: Bjarke estis muzikema kaj ofte akompanis la kluban kantadon per sia banĝo. Kiel malnova membro de la skolta movado li iun vesperon distris la membraron per prezentado de skoltaj kantoj. Alia granda intereso estis pri usonaj indianoj kaj ankaŭ pri tio li iam prelegis.

En 2004 Bjarke estis unu el la danaj partoprenantoj en la Universala Kongreso en Ĉinio, kaj tie li anstataŭis Ileana Schrøder kiel oficiala dana reprezentanto. Dum siaj lastaj jaroj Bjarke akceptis la defiojn de la interreto, kaj per tiu li havis Esperantajn kontaktojn en la tuta mondo. Antaŭ kelkaj monatoj li estis unu el la plej viglaj tradukantoj de teksto, kiun ni poste sendis al UEA.

Du tagojn antaŭ lia forpaso mi vizitis lin en la malsanulejo. Eĉ dum la lastaj tagoj de sia vivo Bjarke ne neglektis Esperanton. Lia bofilino Annette, kiu ankaŭ estas esperantisto, rakontis al mi, ke li propogandis al la flegistinoj pri Esperanto. Vid-al-vide al lia lito pendis esperanta afiŝo (de Peter Weide), kaj li petis, ke Annette kaj mi laŭtlegu por li la revuon 'La Ondo de Esperanto'.

Nome de KEK mi kondolencas kune kun la familio de Bjarke dum tiu ĉi malfacila periodo. Ankaŭ ni dankeme memoros nian amatan amikon.

*Betty Chatterjee*

# Brileto en Meza Oriento

La unua Mezorienta Kunveno okazis pasintjare en Amman en Jordanio. Post tiu ĉi sukceso oni decidis okazigi duan kunvenon ĉi-jare de la 3-a ĝis la 6-a de aprilo, en la turkia urbo Iznik ĉe la samnoma lago sude de Istanbulo. La plej gravaj celoj de tiaj kunvenoj estas la kuraĝigo kaj interkonatiĝo de samideanoj el la regionaj movadoj, kaj partoprenis esperantistoj el Irano, Israelo kaj Turkio. La aliaj apogantaj partoprenantoj venis el 14 landoj: Belgio, Kroatio, Danio, Francio, Germanio Irano, Israelo, Sudkoreio, Nederlando, Italio, Latvio, Pollando, Serbio, Turkio, Hispanio, Svislando kaj Usono.

La aranĝantoj, interalie Renato Corsetti, Murat Ozdizdar (Turkio), Can Zamur kaj Tom Juval (Israelo) gastame prizorgis nin per belegaj ekskursoj en Izniko kaj Bursa (la iama otomana ĉefurbo), interesaj prelegoj kaj viglaj distraĵoj.

La prelegoj temis pri la agado de la movadoj en Irano, Israelo kaj Turkio; en la du unue menciitaj landoj la movadoj jam de multaj jaroj vigle funkcias, kaj la nuntempa movado en Turkio estas nun kreskanta. Ĝoje estis, ke turka junulara grupo kiu ankaŭ partoprenis la kunvenon estis instruitaj dum la kunveno de la Cseh-metoda instruistino el Serbio Tereza Kapista. Alia kaj aktuala prelego de Anna Löwenstein temis pri geografiaj nomoj. La ekzisto de antaŭjuĝoj pri aliaj popoloj kontribuas je la malpaco en la mondo, tial unu el la plej utilaj prelegaj temoj estis la prelego de profesoro Davide Astori el Italio pri eŭropaj antaŭjuĝoj pri turkoj. Esther Schor el Usono gvidis poezio-deklamon de originalaj kaj tradukitaj poemoj de diversaj landoj.



Tiel kiel ofte okazas ĉe Esperantaj aranĝoj, oni ĝuis en Izniko amuzajn distraĵojn. La unuan vesperon okazis la interkona vespero, la duan Georgo Handzlik kantis siajn gajajn kantojn kaj la trian vesperon Saŝa Pilipoviĉ el

Begrado prezentis kabaredan spektaklon kaj du el la komencantoj ankaŭ lerte prezentis teatraĵon.

Post la kunveno okazis postkongreseto la 7-an ĝis la 10-a de aprilo en Istanbulo. Domaĝe estis, ke ne ĉiuj el la kunvenantoj povis partopreni la postkongreson en Istanbulo, ĉar ankaŭ tiu ĉi plenis je memorindaj travivaĵoj. Dum tri tagoj ne eblas ĉiujn vidindaĵojn viziti; tamen Murat Ozdizdar kaj Can Zamur lerte ĉiĉeronis nin, ne nur al la kutimaj ejoj, sed ili montris al ni ankaŭ la interesegajn kvartalojn de Uskudar kaj Kadikoy en la azia parto de Istanbulo, kie okazas la ĉiutaga vivo. Feliĉe mi havis la tempon viziti la Bluan Moskeon, la Aya Sofya-Muzeon, la katakombojn, la Topkapi-Muzeon, kie la sultanoj iam vivis kaj regis la Otomanan Imperion, kaj la Grandan Bazaron.

Niaj afablaj kaj gastemaj turkiaj samideanoj, kiuj ĉiam restis je nia dispono dum la restado en Turkio, vigle agadas por la kreskado de la landa movado. Ili esperas, ke aliaj esperantistoj pripensos kontakti ilin.

# Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tel 55 72 12 40, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk. - Kunvenoj okazas en Grønnegade 10B, konstruaĵo 10, ĉambro 111, ordinare je h 19.30.

***Okazos***

La aŭtuna/vintra sezono komenciĝos meze de septembro per kutimaj vendredaj kunvenoj kaj dum la vintro ĉiumonataj danlingvaj prelegoj, plej ofte la unuan vendredon de la monatoj, kaj kiujn ni anoncos pere de lokaj medioj, kaj kiuj ordinare altiras kelkajn eksterajn interesatojn pri la koncernaj temoj. Unu el la pasintvintraj prelegoj estis tiu de Peter Weide, kiu vekis konsiderindan pripensadon ĉe la aŭskultantoj (vidu ankaŭ lian artikolon en la aprila numero de revuo Esperanto, paĝo 83).

Ni antaŭvidas saman intereson pri la venontaj aranĝoj.

# Kopenhago

Prezidanto: Betty Chatterjee, Vejlegårdsparken 20, st.th., 2665 Vallensbæk Strand. Telefono: 38 89 10 13, retadreso: kek@esperanto.dk. Kunvenoj okazas ĉiun lundon je la 19.30 en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 35, 2400 Kbh NV.

Vendrede 05.06.2009 inter la 14a kaj 18a horo okazos en la Kultura Domo ”alternativa konstitucia tago – familia festo”. Multaj el la grupoj uzantaj Domon estos reprezentitaj, kaj je 15.10 muzikas “Esperanto Desperado”.

08.06.2009 Betty prelegos pri sia vojaĝo al Turkio kaj partoprenintoj en Herzberg rakontos pri la kongreso de GEA kaj EEU.

15.06.2009 Studgrupo. Gvidanto Bent Wiinberg.

22.06.2009 Sezonfina vespero. Kunportu propran manĝaĵon kaj trinkaĵojn por ke ni komune manĝu. Poste okazos somera kvizo. Ĉu vi gajnos la unuan premion ?

**Bonan someron – ekzemple en Bjalistoko kaj/aŭ Liberec!**

10.08.2009 Raportoj pri diversaj someraj kongresoj kaj aliaj travivaĵoj. Gastos nin Atilio Orellana Rojas.

17.08.2009 Ĉu vi somere legis legendan libron? Rakontu pri ĝi, ni petas!

Dimanĉe 23.08.2009 inter 11a-17a horo, okazos “La tago de lingvoj” en LiteraturHaus, Møllegade 7, 2200 København N. DEA partoprenos tie kun budo kaj prelego.

24.08.2009 Raportoj pri la Bjalistoka kongreso. Eventuale kunportu fotojn ktp.

Sabate 29.08.2009 Internacia tago de la komunumo Kopenhago. Ĝi okazos apud Nørrebrogade ĉe la lago inter 12a-18a horo. KEK havos budon.

07.09.2009 Bent Jensenius rakontos pri sia vizito al Madrido.

21.09.2009 Birgit Andersen presentos orepokan bildon (½ horo)

Vendrede 25.09.2009: Ni Celebros la Tagon de Lingvoj kaj la la 150-jaran jubileon de Zamenhof kunlabore kun la Pola Ambasado.

# Ĉeesto karnevala

Hotel Desperado ludis dum la kopenhaga karnevalo en Fælledparken fine de majo. Plej kutime ili ludas tie. Iom lastmomente mi ekvidis pri la anoncado.


Sur mapo estis nomo de la tendo, kie ili ludos certan horon. Mi havis problemojn trovi la lokon, ĉar la organizantoj ne montris nomojn sur la tendoj. Finfine mi ekvidis esperantoflagon, kiun Thorbjørn Køie portis. Estis bona, travidebla flago. Mi renkontis samideanojn kaj bonhumuriĝis. La fama Oleg, kiu gvidis la voĉdonadon proponante instruadon de Esperanto dum la elektoj en Usono, vizitis nin. Mi tamen ne venis tro malfrue, ĉar la koncerto estis prokrastita, pro antaŭaj grupoj.

La spektado estis granda ĝuo. La tendo pleniĝis. Aliaj esperantistoj alvenis. Estis tre amuza distrado je la fino, kiam la instrumentoj de Brian kaj de Kim sovaĝe amumis – iom diskrete en angulo. – Kim anoncis, ke oni kantas en Esperanto.

*Jytte Sunekær*

# Diplomatia piedpilko

Okazis en Nov-Jorko piedpilka ludo la 26-an de aprilo, organizita de ĉiliaj diplomatoj kaj liĥtenŝtejnaj diplomatoj, en kiu partoprenis Ban Ki-mun, Ĝenerala Sekretario de UN, kaj dudeko da aliaj ambasadoroj.



La publiko konsistis el malpli ol cent familianoj kaj amikoj de la diplomatoj kaj kelkaj reprezentantoj de NeRegistraj Organizaĵoj. Inter ĉi tiuj estis Neil Blonstein, reprezentato de UEA ĉe UN en Nova Jorko, kiu profitis la okazon por alparoli multajn pri Esperanto, inkluzive de la Ĝenerala Sekretario de UN.

Jen li en foto (dekstre) kun Ban Ki-mun (meze) kaj la brita ambasadoro John Sawyers.

# La 9-a KEF

***"Kultura Esperanto-Festivalo" estas la plej granda granda kaj grava kultura evento de Esperanto-kulturo. La festivalo estas por ĉiuj, ne nur Esperanto-parolantoj. En la lernejo Skolen ved Kongevejen, Trækbanen 18, Helsingør, estos surplanka tranoktejo kaj okazos la pliparto de la programo.***

## Por ne-Esperanto-parolantoj

Neesperantoparolantoj povas ĝui la festivalon en pluraj manieroj. Ekzemple ili povas aliĝi por la tuta festivalo kaj lerni la Esperanto-kulturon. Dum la antaŭtagmezoj estas instruado en Esperanto de Jonas Dalsmose, Regin Larsen kaj Peter Weide. Posttagmeze ili povas partopreni la pli aktivajn metiejojn kiel ekzemple muziko, nov-cirko, ridklubo, danco gvidata de la artistoj. Dum la vesperoj ili povas spekti teatron kaj ĝui la grandan amason da muzikaj artistoj kiuj venos al KEF ĉi-jare.

Por A-landano (Danio, Svedio, Norvegio, Germanio) bileto por la tuta festivalo (inkluzive instruadon, manĝojn kaj amasloĝejon) kostas:

550 kr (malpli ol 20 jaroj)
700 kr (inter 20 kaj 30 jaroj)
800 kr (pli ol 30 jaroj).

Unutagaj biletoj kostas: 150 kr (inkluzive manĝojn).
Koncertoj kostas plejparte 50 kr.

La amasloĝejo estos la lerneja gimnastika salono, kien ni provos havigi matracojn tiel ke vi kuŝos komforte. Kompreneble eblas ankaŭ tranokti en la ne relative proksima migrulhejmo aŭ en hotelo. Jam pluraj partoprenontoj mendis tion.

## Internacia festivalo

La festivalo estas internacia en pluraj niveloj. Kompreneble venos multaj artistoj kaj partoprenantoj de multaj landoj kaj kontinentoj. Granda grupo de Ruslando aliĝis, sed ankaŭ partoprenantoj de Usono kaj Kanado venos. Fakte eĉ 7 afrikanoj de diversaj landoj aliĝis, ni nur scivolemas ĉu la dana

registraro donos al ili turistan vizon. El Eŭropo venos multaj, fakte nur iom mankas danoj, kaj ni esperas ke vi kompreneble ankaŭ venos por ĝui la originalan Esperanto-kulturon. Sed ne nur per partoprenantoj la festivalo estas internacia. Fakte la Festivalo mem estas internacia ĉar ĝi okazas en 2 landoj! Merkrede la 8-an julio la koncertoj okazas en Helsingborg. Do festivalo en 2 landoj.

## Iomete pri la programo

Dum la tago okazos multaj metiejoj. Kazaĥia Ĵomart gvidos la infanan rokbandon. Portugala Rut Jesus gvidos plurajn metiejojn ekzemple kontakt-improdancon kaj ridklubon. Ankaŭ la grupo Kapriol' instruas dancojn vendrede la 10-an de julio, la tagon antaŭ ilia koncerto kie oni do povas danci la dancojn dum la koncerto. Se vi ne antaŭe aŭdis pri Kapriol', vi eble aŭdis pri Kajto. Do fakte estas Marita kaj Marian el Kajto kiuj fondis novan orkestron kune kun Ad kaj Rutger, kiuj jam abunde meritis siajn spronojn ĉe la bandoj Blue Tape Band kaj Kalis. Kvarope ili formas la novan grupon Kapriol' kaj prezentas svingan kaj varian programon kun balfolk-dancmelodioj kaj kantoj tradiciaj nederlandaj aŭ memfaritaj.




Koncize dirite, ili ludas kaj malnovan muzikon per novaj muzikiloj kaj memfaritan muzikon per malnovaj muzikiloj. Ĉion ili kombinas kun bela plurvoĉa kantado kaj plurkoloraj aranĝoj. Krom tio improvizado estas grava parto. Ĝuu ilin vendrede dum dancinstruado kaj sabate dum koncerto.



Dumtage vi ankaŭ povas lerni kiel poemi en Esperanto. Instruos Sten Johanson, kiu estas sveda verkisto kaj tradukisto tre produktiva, kaj jam de 1986 verkas novelojn, poemojn, krimromanojn, eseojn, eĉ teatraĵojn originale en esperanto. Li estis premiita en la Belartaj Konkursoj plurjare, plurbranĉe. Li ankaŭ tradukis en Esperanton plurajn svedajn verkistojn. Ŝuldiĝas al Sten, ke ni povas legi interalie pri Nils Holgersson Esperante.

Sten verkas lingve tre lerte, klare, sen superflue balastaj novaĵoj, sed ja en suke viveca stilo, kun bele dozitaj trafaj esprimoj. Li ĉiufoje vekas tiel realecan etoson en siaj romanetoj, ke oni emas eklegi pli... Sed legante krim-romanojn, aŭ spektante tiajn filmojn – precipe se estas seriaj liveraĵoj – oni foje povas malagrable kaptiĝi de la dubo, ĉu vere en *tiu* urbeto okazas tiom da teruraj krimoj? Aŭ ĉu vere ĉiufoje kiam certa aktor(in)o surscenejiĝas iuregione, ĉu vere tuj okazu tie iu murdo?

Interalie pri ĉi-lasta temo, krimromanoj kaj kiom da krimoj povos, do, okazi unuurbe, ni parolos kun Sten en KEF. Kaj pri multaj aliaj temoj. En la ”Literatura Angulo” ĵaŭde posttagmeze Sten prezentos siajn verkojn propravoĉe.

En la cetera programo tage kaj nokte estas filmoj, novcirko, hiphopa lernejo, gufujo, laŭtlegado, nokta diskejo, homfutbalo, teatraĵoj de TTT (nova teatro de Tuluzo), esperanto-ludoj, aranĝoj en la urbo, turismado en Helsingborg kaj Helsingør/Elsinoro ktp.

## Aliĝo

Vidu pli pri la artistoj en la hejmpaĝo www.kef.saluton.dk. En la hejmpaĝo vi ankaŭ trovas ĉiujn aliajn informojn kaj povas aliĝi al la festivalo.

Vi ankaŭ povas peti aliĝilon ĉe Jytte Sunekær, Højlundshusene 16, 3500 Værløse. Telefono 44 48 47 26.

## Vespera programo de KEF-9

*Marde la 7-an de julio*
Junas kaj pli junas – la fratoj Jonas kaj Mathias Dalsmose
Hotel Desperado – mondmuziko el Kopenhago
Pafklik – repgrupo el Francio
Tone – repisto el Brazilo

*Merkrede la 8-an de julio*
Ĵomart kaj Nataŝa kun la filino Karina
Amir Hadžiahmetović kun amikoj

*Ĵaŭde la 9-an de julio*
Vivanta karaokeo
Zhou Mack
Solotronik

*Vendrede la 10-an de julio*
Jomo
La Perdita Generacio

*Sabate la 11-an de julio*
Martin Wiese kaj la talpoj
Inicialoj DC

(Ŝanĝoj povas okazi).

*La KEF-teamo*



*La ĉefKEFejo, Skolen ved Kongevejen en Helsingør*

# Legio de Bona Volo

En Brazilo oni multe uzas Esperanton ĉe la organizo Legio de Bona Volo (LBV), fondita en la jaro 1950. De tiam la organizo jam uzas Esperanton por aperigi librojn, gazetojn, paĝaron en interreto k. a. Krom tio LBV instruas la lingvon de Zamenhof en siaj lernejoj, diversaj konstruaĵoj, al kiuj la popolo iras por ricevi helpon kaj apogon.

Legio de Bona Volo naskiĝis antaŭ 59 jaroj en la urbo Rio-de-Janeiro, sed aktuale ĝi havas filiojn kaj branĉojn tra la mondo, en diversaj landoj, inkluzive de Usono, Portugalio, Argentino, Urugvajo, Paragvajo kaj Bolivio. LBV ĉiam prizorgas malriĉajn familiojn, oferante al ili diversajn bezonatajn helpojn. Miloj da infanoj ĉiutage iras al LBV por ricevi edukon kaj prizorgon.

La uzado de Esperanto en LBV okazas ankaŭ ĉe la granda Piramido, Templo de Bona Volo, la multe vizitata monumento en la ĉefurbo de Brazilo. La templo estas ekumena kaj akceptas ĉiutage vizitantojn el diversaj landoj. Ene de la Piramido estas multaj ĉambroj por diversaj kialoj, ekzemple la ĉambro tiel nomata Art-Galerio, kiu akceptas artistojn el la tuta mondo. Estas muzeoj, ĉambro por muzik-prezentado, k.a.

Al ĉiuj kiuj volas viziti Brazilon, povas kontakti LBV kaj ĝi certe helpos turistojn pri akceptado kaj gvidado en Brazilo.

Alia punkto tre grava pri LBV, temas pri tio ke ĝi reprezentas Latin-Amerikon ĉe la Ekonomia Konsilantaro de Unuiĝintaj Nacioj.

La prezidanto de LBV estas s-ro José de Paiva Netto, fama verkisto kaj ĵurnalisto, kiu multe subtenas Esperanton. Li diris: "Ni devas labori kune por la konstruado de pli bona mondo."

Se vi volas pli da informoj pri LBV, bonvolu viziti la retejojn: http://www.bonavolo.com/, http://www.paivanetto.com.br/, http://www.tbv.com.br/.

*Paulo Cesar Pereira*

# Esperanto en la balotoj

Laŭ decido de la balota komisiono de la 10-a de aprilo, la germana sekcio de la politika movado ”Eŭropo–Demokratio–Esperanto” (EDE) rajtas partopreni en la Eŭropaj Balotoj 2009 en Germanio. Tio signifas, ke ĝis la komenco de junio la germana ŝtato presigos almenaŭ 64 milionojn da balotiloj, sur kiuj troviĝas ĝia nomo. Ankaŭ la nomoj de la 10 kandidatoj de EDE-Germanio – kun prof. d-ro Reinhard Selten sur la unua loko – troviĝos sur ĉiu voĉdonilo.

EDE starigas listojn ankaŭ en ĉiuj regionoj de Francio, tiel ke entute ĉ. 108 milionoj da eŭropanoj (64 milionoj en Germanio kaj 44 milionoj en Francio) havos la eblecon subteni la disvastigon de Esperanto per sia voĉo. Dum en Germanio ĉiu voĉdonanto aŭtomate trovos EDE sur la balotilo, en Francio oni bezonos specialan voĉdonilon. EDE planas presigi kaj disdoni 7 milionojn da ili, kaj krome oni ofertos la eblecon elŝuti ilin el interreto.

En Germanio entute 32 partioj kaj politikaj asocioj partoprenos la balotojn – pli ol iam ajn antaŭe. Jam nun ĵurnalistoj publikigis la opinion, ke tiu ĉi abundo povus instigi la grandajn partiojn akcepti ideojn de la novaj politikaj movadoj. Tiel ankaŭ EDE esperas, ke ĝia baza ideo, plibonigi la kompreniĝon pere de Esperanto kaj tiamaniere akceli lingvan egalrajtecon kaj demokration sur eŭropa nivelo, ekhavos novajn impulsojn.

Pro la partopreno en la balotoj, EDE povos senpage elsendi varbajn filmetojn en la germana kaj franca televido. Krome oni klopodas multe informi ekzemple pere de afiŝoj, faldfolioj, informstandoj kaj gazetaraj komunikoj. Eĉ se (pro la neceso superi la 5 %-an sojlon en Germanio kaj Francio) la akiro de seĝo en la parlamento ne ŝajnas esti realisma, nun milionoj da homoj ekscios pri la ekzisto de Esperanto, tiel ke certe ankaŭ la ĝenerala Esperanto-movado profitos de la balotoj.

Laŭ realisma takso, EDE povos atingi en Germanio kaj Francio sume ĉ. 100.000 voĉojn. Jam tia nombro certe pli impresus la eksteran mondon ol la membronombro de la diversaj Esperanto-asocioj en Eŭropo. La eŭropaj balotoj do povas grave helpi en tio, ke oni prenos la Esperanto-movadon pli serioze.

*Ulrich Matthias, vicprezidanto de EDE-Germanio*

# Nokto de lingvoj

Se survoje al la UK en Bjalistoko vi planas viziti Krakovon aŭ dezirus veni al la plej bela pola urbo, ni invitas vin partopreni en – kaj, se eblas, iom kontribui al – la eksterordinara, nova, publika, leĝerforma Esperanta kaj tuturba aranĝo: "Nokto de Lingvoj". Ĝi okazos la vesperon antaŭ la UK: la 24-an de julio, 18-22h. En la urbo jam okazadas Nokto de Muzeoj, Nokto de Teatroj k.a. Esperantistoj decidis starigi novan Nokton, kiun ni deziras realigi nur per uzo de Esperanto, por montri, ke tiu ponto-lingvo sufiĉas por fari grandan publikan, interkulturan aranĝon. La Nokton patronos grandaj amaskomunikiloj.

***Nia komuna ago***

Allogaj programeroj kaj fine, JoMo. La Nokto de Lingvoj okazos en du lokoj:



- sur la Malgranda Ĉefplaco, situanta tuj apud la granda krakova Ĉefplaco. Tie okazos informado pri Esperanto, lecionetoj, lingvaj diversaĵoj, ekzemple oni povos ekkoni sian nomon en 27 lingvoj, ricevi ĝin skribitan per nelatinaj alfabetoj, ricevi la nomon de objekto, kiun oni ofte uzas, en 26 lingvoj ktp. Bonvolu vidi aliajn erojn ĉi-sube.
- en la la Urbocentra Kulturdomo, kie okazos – samtempe en kvin salonoj – mallongaj prezentadoj de lingvoj far ILEI-konferencanoj kaj poste, koncerto de JoMo en 25 lingvoj (Guinness-rekordo 2008). La partoprenintoj de lingvaj prezentadoj-kursetoj povos ricevi "Diplomon de poligloto".

### *Lerni iom pli...*

Kunlaboras Jagelona Universitato, kiu faras specialan sciencan esploron pri la socikultura situacio, en kiu vivis L. Zamenhof. Tiu altkvalita scienc-aĵo, prezentota dum la Nokto, kun ĉeesto de profesoro, eminenta fakulo pri tiu epoko, pliriĉigos sciojn de esperantistoj pri Zamenhof mem. La studo uzas originalajn sciencajn atingojn de la universitato kaj interesan metodo-logian aliron (interalie evidentiĝas, ke la enhavo de "Sinjoro Tadeo" de Mickiewicz estas unu el la ŝlosiloj al kompreno de la epoko posta al la verko.

Bonvolu veni iom helpi nin, esperantistojn, kaj ĝui, aŭ simple, nur spekti kaj eble trovi ideojn por via agado... Se vi deziros veni pli frue, vi povos ĝui ankaŭ nemultekostajn vizitojn kun Esperanta ĉiĉerono en la urbo kaj la regiono, kaj Esperanto-aranĝojn: La ILEI-Konferencon (17-25 jul.), simpozion.

### *Kiel vi povus helpi*

Ni petas pri jena kontribuo dum parto de la vespero:

- prezenti sian lingvon kaj kulturon dum 20 min. + respondi demandojn
- fari E-lecionetojn per rekta metodo, poloj - per ajna metodo
- informi vizitantojn pri E-o; eksterlandajn turistojn informi en aliaj lingvoj
- konversacii kun urbanoj en sia lingvo (10-minutaj konversacioj, dum parto de la vespero)
- skribi nomojn de vizitantoj laŭ sialingva aŭdo
- skribi nomojn de vizitantoj en sia alfabeto - la peto koncernas uzantojn de nelatinaj alfabetoj!

Ideoj pri alia kontribueto estas bonvenaj. Al la interesatoj mi volonte sendos pliajn informojn.

### *Hotelo, veturo al la UK*

Disponeblas bonaj, tri-stelaj, sed malmultekostaj, preskaŭ studentprezaj hotelĉambroj. Ni invitas vin kune veturi al Bjalistoko, la 25-an de julio, per trajno, en rezervita por esperantistoj vagono.

***Ekzemplo de publika aranĝo***




Ni kutimas regule prezentadi Esperanton kadre de grandaj krakovaj nemovadaj aranĝoj (vidu la apudan foton). Sed, la Nokto de Lingvoj, kvankam urba kaj publika, estos ”nia aranĝo”!
Nome de la organizantoj: la Urbocentra Kulturdomo, ILEI kaj la Studenta Scienca Esperanto-Rondo de Jagelona Universitato, elkore salutas (kaj atendas) vin Maria Majerczak, aŭtorino de la projekto de la Nokto de Lingvoj .

# UEA rete viviĝas

La 15-an de majo 1998 estis dissendita la unua numero de Gazetaraj Komunikoj de UEA. Precize 11 jarojn poste la populara novaĵservo ricevis aŭdvidan kunulon, kiu nomiĝas "UEA viva". Temas pri 10-minuta filmĵurnalo en YouTube kun mallongaj raportetoj pri aktualaĵoj en la vivo de UEA kaj TEJO kaj de la Centra Oficejo. Ĉiufoje oni prezentas ankaŭ novaĵon en la Libroservo. Komence oni planas prepari "UEA viva" kun intervaloj de unu-du semajnoj. Gazetaraj Komunikoj plu aperos kiel antaŭe.

Eblas jam rigardi en YouTube la 2-an numeron de la filmĵurnalo ”UEA-viva” kun informoj de Emilio Cid pri la gazetara informkampanjo ĉirkaŭ UK, sonscenoj el ĉiutaga laboro de UEA. Katalin Kováts instigas subiĝi al la nova ekzameno de UEA konforma al Eŭropa Referenckadro, prezentante ĉeokaze tiucelan preparlibron ”Esperanto de nivelo al nivelo”; TEJO-volontuloj interŝangas laborrimarkojn; la korektado de la revuo enzorgigas multajn.

Iru al la retpaĝo http://www.youtube.com/user/UEAviva.

*[GK UEA]*

# Pasporta Servo surrete

***Pasporta Servo estas adresaro de homoj el la tuta mondo, kiuj senpage akceptas gastojn en siaj hejmoj. Por tio, la gasto devas nur posedi la aktualan adreslibron (kaj paroli Esperanton). La adreslibro 2006 ekzemple enhavis 1320 gastigantojn en 92 landoj. Ni ĝojas, ke ni povas prezenti al vi la aliĝsistemon de la nova Pasporta Servo!***




Post plurmonata laboro la PS-teamo ĵus finpreparis la aliĝsistemon de la nova retejo http://www.pasportaservo.org kaj por la unua fojo, ni petas vin plenumi anstataŭ la ĝis nun kutima papera aliĝilo la tutnovan retan aliĝilon. La reta aliĝo plenumas la saman funkcion: Vi aperos kiel gastiganto de Pasporta Servo kaj en la PS-libreto, kaj en la nova retejo.

**Kiel mi aliĝos al la nova sistemo?**

Simple iru al http://www.pasportaservo.org kaj alklaku **Membriĝi** supre en la paĝo. Post plenigo de la kampoj kaj akcepto de la uzokondiĉoj, vi ricevos pasvorton en via retpoŝto. Per ĉi tiu pasvorto vi povas eniri la paĝaron kaj poste aldoni detalojn pri gastigado. Ne forgesu eniri la paĝon post ricevo de la pasvorto kaj tie aldoni la gastigo-detalojn, ĉar alikaze neniu povos kontakti vin pri gastigo!

**Mi ja pretas aliĝi en la reto, sed tamen volas, ke gastoj anoncu sin telefone aŭ per paperletero. Kion fari?**

Tamen aliĝu en la reto, kaj simple indiku ke gastoj kontaktu vin nur per telefono aŭ paperpoŝto.

**Mi ne volas, ke miaj telefonnumero kaj adreso aperu en la interreto, ĉu mi tamen aliĝu?**

Senprobleme! Vi povas facile elekti, ke viaj adreso kaj telefonnumero ne aperu en la interreto, kaj ke gastoj kontaktu vin per la retpaĝo sen vidi vian retadreson.

**Mi faris eraron kiam mi entajpis miajn datenojn, aŭ poste ŝanĝis mian telefonnumeron. Kion mi faru?**

En la nova sistemo, tio ne plu estos problemo! Vi facile povas ensaluti kaj ŝanĝi viajn datenojn.

**Kiam aperos la papera eldono?**


Ĝi aperos komence de junio 2009.

**Mi volas aliĝi kiel gastiganto, sed preferas paperan aliĝilon. Al kiu mi min turnu?**

Bonvolu turni vin al la Centra Oficejo de TEJO/UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Vi povas aliĝi eĉ per telefono! Simple alvoku la Centran Oficejon kaj petu la TEJO-oficejo dum ofic-horoj, lunde - vendrede de 9-a ĝis 16-a, tel: +31 10 43 6 1044

Kara PS-gastiganto, ni multe dankas al vi pro via subteno de Pasporta Servo. Ni dankas al vi ankaŭ pro via pacienco, kiun ni postulis pro la novprogramado de la retpaĝo. Ni esperas, ke danke al la nova teknologio kaj via daŭra subteno PS havos prosperan estonton.

*Joop Kiefte, PS-komisiito*
*Gregor Hinker, prezidanto de TEJO*
*[Ret-Info]*




*Kien iri por praktiki Esperanton dum la ferioj? Konsultu mondakalendaro.org.*

# Impresoj el Herzberg









